

ĉu ĝi petu patentojn, kaj ĝi ricevis multajn demandojn de komercaj organizoj, kiuj deziras scii pliajn detalojn pri ĝi.

En la nuna tempo la aerarmeo ne malkaŝis pli ol limigitan kvanton da informoj, pro reguloj por la sekureco, kaj ĝi ankoraŭ konsideras, ĉu ĝi verku, aŭ ne, pli detalan priskribon pri siaj esploroj, por ke ĝi eble publikiĝu en sciencaj gazetoj. D-ro CLEMENS, kiu estras la fakon por la fizika esplorado ĉe la laboratorio en Dayton, diris, ke oni povus uzi la elpensajon por produkti energion en malproksima aviada stacio, kie estus malfacile funkciigi normalajn metodojn, aŭ en kelkaj cirkonstancoj oni povus disvolvi ĝin, tiel ke ĝi povus funkciigi motor-generatorojn, kiuj provizas elektran energion por urbo. Sed la sciencistoj de la aerarmeo, al kiuj mi parolis, opiniis, pro motivoj kiuj rilatas al la sekureco, kaj pro aliaj motivoj, ke estus por ili malsaĝe antaŭdiri la estontecon de ĉi tiu suna generatoro."

019.941 (048.1)

RECENZO KAJ BIBLIOGRAFIO.

La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto), de D-ro Ivo LAPENNA, eldono de Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono, 1954. — Formato 18 × 12,5 cm²; 192 paĝoj, inklude 13-paĝan indekson; tola bindaĵo. Prezo: 10 br. ŝil. + 6 p. por afranko.

La agado de UEA ĉe UNESKO unupartite, la kandidatigo de UEA por la Nobel-premio por la Paco aliparte, devigis al kolektado de ĉiuj faktoj pri Esperanto kaj pri UEA. CED entreprenis tiun laboron kaj ni, esperantistoj, devas esti dankaj ke nun en bela, presita formo ĉi tiu materialo estas je la dispono de ĉiu el ni je la vere malalta prezo de 10½ ŝilingoj. Ja ĉiu el ni trovos en ĝi multon sciindan, kaj precipe por tiuj kiuj nur post la milito esperantistiĝis ĝi estas riĉega fonto de informoj. Kelkfoje oni esprimas la opinion ke la atingoj de Esperanto en ĝia jam tiel longa ekzisto estas ja neniel spektaklaj, kaj vere, kompare kun niaj deziroj, la jamaj atingoj ofte ŝajnas al ni ridinde, hontige malgrandaj. Sed kiom ni efektive scias pri la faktoj? Legante ĉi tiun libron vi trovos kaŭzon iom fieri pri la multega laboro farita, pri la vere ne neglektindaj atingoj. Ho, ne venis jam la tempo kiam ni rajtos ripozi sur niaj laŭroj. Kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, jam finiĝis la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, kaj nepre certe estas ke ankoraŭ atendas nin multjara sindona laborado. Iuj mortos; kelkaj, laciĝinte aŭ perdinte la kuraĝon, forlasos niajn vicojn; aliaj prenos la vakiĝintajn lokojn.

La Nobel-premion 1954 UEA ne ricevis; la mon-manko provizore ankoraŭ daŭros, kaj, kiel en la pasinto, ja povos ĝeni, sed ne haltigi nin. La libro de LAPENNA donu al ni freŝan kuraĝon, al nia movado novan impeton en la ankoraŭ longa lukto kontraŭ ŝajne superfortaj potencoj. La potenco de Esperanto sidas en tio ke ĝi kaj ĝia interna ideo inspiris, inspiras kaj inspiros

homojn al amo, al krea laboro, al ĝisvenka batalo kontraŭ inerto kaj malbonvolo.

La libro de LAPENNA provizas nin per faktoj per kiuj ĉe iuj ne malbonvolaj, ne tro inertaj homoj ni povos venki la inerton kaj vekti la idealismon.

La Unua Parto, preskaŭ centpaĝa, temas pri „Esperanto kiel Solvo de la Problemo de Internacia Lingvo” kaj konsistas el jenaj ĉapitroj: „Formiĝo, Ekesto kaj Evoluo de Esperanto”; „Opinioj pri la Valoro kaj Signifo de Esperanto”; „Instruado de Esperanto”; „La Esperanta Literaturo” Originala kaj Traduka, „Scienca, Faka kaj Popularscienca Literaturo”; „Fakaj Vortaroj kaj Terminaroj”; „Gazetaro”; „Diversaj Formoj de Praktika Aplikado de Esperanto” (en komerco, turismo, radio, PTT, sonfilmo, prelegvojaĝoj, privataj vojaĝoj, korespondado), „Internacia Esperanto-Muzeo en Wien”.

La Dua Parto havas la titolon: „Esperanto-Organizajoj. Iliaj Celoj kaj Laboro”, kaj jenajn ĉapitrojn: „Organizajoj por Disvastigo de Esperanto” kaj „Organizajoj por Praktika Utiligo de Esperanto”. La Tria Parto, ĉirkaŭ 40 paĝoj, temas pri UEA, ĝia historio, ĝia nuna organiza formo, ĝia kultura agado (Internacia Somera Universitato, Belartaj kaj Oratoraj Konkursoj), ĝiaj praktikaj servoj, kaj ĝiaj aliaj aktivadoj por interfratigo de la popoloj. En la „Konkludo” Profesoro LAPENNA diras: „Sesdek ses jarojn praktike funkcias la Internacia Lingvo. Sesdek ses jarojn la Esperanto-Movado faras grandegajn servojn al la Homaro kaj tute speciale al la afero de la tutmonda paco komence pli-malpli spontanee, precipe post la jaro 1908 pli kaj pli organizate sub la gvidado de UEA preskaŭ sen iu ajn morala aŭ materia helpo fare de gravaj internaciaj aŭtoritatoj.” La aŭtoro atentigas pri tio ke la malbonvolaj potencoj, esence kontraŭaj al internacieco kaj homeco, kiel ekzemple la naziismo, multe pli klare vidis kaj komprenis la veran signifon kaj esencon de la lingvo internacia, ol faris tion ĝis nun la sinceraj batalantoj por la tutmonda paco.

Finas la libron „Bibliografio kaj dokumentoj” kaj Indekso.

Mia ĉefa kritiko rilatas al la paĝo 84-87, kie temas pri la praktika utiligo de la lingvo internacia en la scienco kaj tekniko. Inter la verkoj (tradukitaj kaj originalaj) tie menciitaj troviĝas, apud pli aŭ malpli ampleksaj verkoj aparte eldonitaj, ankaŭ artikoloj aperintaj en diversaj sciencaj gazetoj. Tamen, mencio aŭ ne-mencio evidente dependis de pura hazardo, ne de la graveco de la enhavo aŭ de la meritoj de la lingvaĵo. La granda plimulto de la sciencaj kaj teknikaj gazetartikoloj aperintaj en la lingvo internacia en fakaj gazetoj ne-esperantaj ne ricevis mencion, nek kiu ajn artikolo en gazeto esperantista. Ŝajnas al mi ke ĉi-rilate sekvi unu linion estus preferinde. Cetere mankas en tiu bibliografio libroformaj verkoj kiuj ja meritis mencion, ekzemple inter la tradukitaj: BÜHRER kaj SAAGER: „La Organizado de la Intelektala Laboro”; TAKASE: „Kemias Strukturoj kaj Fiziologiaj Agoj”; inter

la originaloj: A. P. Andreev: „Revolucio en la Lingvoscienco“; kaj la granda kaj grave dulingva (angla-esperanta) „Fotometria Atlaso de la Sunospektro“ de Prof. M. Minnaert, G. F. W. Mulders, kaj J. Houtgast. Estas vere ke la aŭtoro ja klare diras ke li povas menciĝi nur kelkajn el la jam multaj esperantlingvaj verkoj en kampo scienca kaj teknika; mia kritiko do rilatas al la elekto kaj la ne-mencio ke inter la publikigajaj menciitaj troviĝas kaj libroj kaj broŝuroj, kaj gazetartikoloj.

Mi trovis kelkajn malmultajn preserarojn pp. 27 (*simbolaj* anstataŭ *simboloj*), 73 (*kaŭzaka* anst. *kaŭkaza?*), 87 (*animo* anst. *amino*), 100 (1901 anst. 1909?), 107 (*originale* anst. *originala*); sur pp. 158 kaj 169 mi trovis respektive: *Dresdeno* kaj *Drezdeno*. Krome min frapis kelkaj iom strangaj esprimoj: p. 35: „Ĝis ĉi komunajo volas havi komunan lingvon, ĝi konservas tiun lingvon.“ Pli logike oni diru: „*Dum*“ aŭ *Tiel longe kiel*“, ĉar ja temas ne pri „ĝis ĝi volas“, sed pri „ĝis ĝi ne volas plu“. Sur p. 82: „85 sciencistoj, el kio“ anst. el (aŭ *inter*) *kiuj*“. Fine, sur p. 142 la aŭtoro mencias ke en 1953 UEA havis membrojn en 84 landoj kaj reprezentis entute 16861 organizitajn esperantistojn. Kompreneble ĉi tiu nombro estas interesa pro sia simetrio kaj pro tio ke oni povas derivi ĝin el la nombro 84 (de la landoj) per duobligo, rezultiganta la nombron 168, kaj simetriigo. Ke praktike ne estas eble, iom precize kalkuli la nombron de la esperantistoj organizitaj, sekvas el tio ke ja multaj estas membroj de pluraj organizaĵoj. El la membro-nombroj de tiuj organizaĵoj oni do povas konkludi nur proksimume pri la nombro de la organizitaj individuoj, eble povas indiki nur inter kiuj limoj tiu nombro devas troviĝi, kaj la intervalo inter tiuj limoj ja povas esti tre vasta.

Strange estas ke duloke (pp. 57 kaj 86) la aŭtoro citas la libron de E. Aisberg kiel: „Fine! Nun mi komprenas la radion!“, dum mia ekzemplero montras sur la kovrilo (kaj fronte, kaj dorse) la titolon: „Fine mi komprenas la radion“, kaj sur la titolpaĝo, kredeble pro plifacila disduonigeblo: „Mi komprenas fine la radion!“

Kompreneble ĉi tiuj malmultaj kaj malgravaj makuletoj neniel deprenas de la vere tre granda valoro de ĉi tiu por ni tiel grava verko. — W. P. R.

Kaj tamen Dio estas amo de D-ro F. W. A. Korff, esperantigis W. Versteeg-Graftdijk, eldonis J. N. Voorhoeve, Den Haag, Nederlando. 12 × 19 cm², 29 p.

Ĉi-tiu bele eldonita libreto pritraktas la Dian amon laŭ la Kristana kredo. La aŭtoro parolas kun sia leganto. Li vortigas viajn demandojn kaj klopodas doni kontentigajn respondojn. Li sukcesas vekii vian intereson kaj instigas vin al plua pripensado. Finleginte la libreton vi nur bedaŭras ke vi ne plu povas paroli kun la aŭtoro pri la solvo de la problemoj. Ŝajnas al mi ke ĝuste en la fino la aŭtoro ne tute sukcesis klarigi al la leganto la Biblian predikon pri la savo en Jesuo Kristo per la fido.

La bele aspektanta libreto havas valoran kaj legindan enhavon, sed la traduko ne estas laŭdinda. Kompreneble ĉiu traduko iel difektas la originalon, ofte laŭlitera traduko estas malebla, sed la tradukintino ne nur malbeligis la originalon, ofte ŝi ne trafis la sencon, foje ŝi eĉ tute fuŝis ĝin.

Ekz.: Ĉu vi komprenas la esprimon „*spirita interparolado*“? (6). Kial uzi „ni devas neniam kredi“ (6) se vi nur volas diri: „vi tamen ne opiniu“? „*Sciigo*“ (6) ne sufiĉas por „prediko“. Kaj „komisio“ ne taŭgas por indiki la enhavon de la prediko (21). Preseraroj abundas kaj eble tial la esprimo „*kaŭzoj* al si mem“ (21) estas nekomprenebla. „*Reĝo*“ kaj „*regno*“ (21) estas interŝanĝitaj kaj pro tio tuta alineo fariĝis sensencaĵo! „*Estu tia*“ devas esti „*estu tiel*“ (12), „*certeco*“ certigo (7), turnas turniĝas (15) k.t.p. k.t.p.

Kial uzi ripetfoje „*de l*“ anstataŭ „*de la*“ senbezone? Kial citi la tekstojn el la Biblio ne laŭ la Zamenhofa traduko? Kial, parolante pri Dio, uzi jen „*Li*“, jen „*li*“?

Mi nur povas bedaŭri ke la tradukintino ne petis konsilon de teologo kaj pli kompetenta esperantisto.

F. A. Hofman.

Familio kaj Popolo („*Familie und Volk*“), germana geneologia kaj loĝantarscienca revuo redaktata de d-ro Erich Wentscher kaj prof. d-ro Hermann Mitgau (Eldonejoj Degener & Co, kaj Heise); jarkolektoj 1 kaj 2 (Göttingen 1952-53).

Tiu ĉi nova fakrevuo, kunigita el la du geneologiaj revuoj „*Genealogie und Heraldik*“ kaj „*Göttinger Mitteilungen für genealogische und heraldische Forschung*“ aperis en 5 kajeroj po jarkolekto. Laŭ la enhavo la geneologiaj artikoloj estas pli nombraj ol tiuj pri la loĝantarscienco. La lasta scienco estas aŭ devas esti la bazo por la loĝantarpolitiko. La komuna objekto de la geneologio kaj la loĝantarscienco estas la popolo. La unua rigarda la popolon en ĝia plej malgranda strukturunuoj, la dua en ĝia tuteco. Tiel ambaŭ fakoj fakte apartenas unu al la alia. Kiel problemojn de la loĝantarscienco d-ro Wentscher montris en sia antaŭparolo tiujn de la alurbemo, de la grandurbo kaj de la refluo en la industriajn regionojn. La sola prilokanta artikolo pritraktas la novajn geedzojn inter orient-eŭropanoj kaj okcident-eŭropanoj, sociologia studaĵo pri la geedziĝoj inter la germanaj forpelitoj, konsiderita laŭ la enradikeco aŭ la gentfideco. Alia artikolo estas dediĉita al la fama genetikisto prof. d-ro Fritz Lenz pro lia 65-a naskiĝtago. La aliaj artikoloj en la unua jarkolekto estas geneologiaj. Pli grava por monda legantaro estas la dua jarkolekto. Kelkaj artikoloj en ĝi estas kontribuaj al la ĝenerala (teoria) geneologio kiel vera scienco. Ili traktas inter aliaj du problemojn: la homan karakteron de geneologia vidpunkto kaj la plej bonan metodon numeri la personojn en pragepatra tabelo. Menciindaj estas plue verkajo titolita „*Logikaj meditaĵoj pri la pragepatraro*“ de prof. d-ro F. von Klocke kaj verkajo „*Pri la gra-*